

Antaŭparolo

La tria numero de la nova serio de *Esperantologio/Esperanto Studies* nun troviĝas antaŭ vi. En sia nova vesto, la revuo estas denove firme establita. Tiu ĉi tria numero proponas entute ses artikolojn kaj du libro-recenzojn kiuj ĉiuj pritraktas, el diversaj vidpunktoj, la lingvon mem: Sabine Fiedler pri anglalingvaj elementoj en Esperanto, Tida Syuntaro pri la rolo de adjektivoj en Esperanto, kaj Wim Jansen kaj Otto Prytz pri vortfarado. Fakte, en siaj artikoloj Fiedler kaj Prytz ambaŭ certagrade traktas pruntadon el la angla. Fiedler prave atentigas pri la lingva konscio kaj lingva estetiko de parolantoj de Esperanto, kiuj certagrade rezistas la enŝteliĝon de fremdlingvaj influoj; sed ne eblas eviti la fakton, ke, ju pli insiste la angla lingvo fariĝas iuspeca universala komunikilo, des pli ofte ĝiaj neologismoj aperos alivestite en Esperanto, kaj des pli malofte oni celos kunmetitajn formojn por esprimi nove aperintajn nociojn. Unu el la plezuroj de Esperanto (kaj sekve ĝia estetiko) estas ĝia lingva manipuleblo. Ni daŭre kreu kaj uzu kunmetitajn formojn, paralele kun la neceso foje formi novajn vortojn por novaj konceptoj.

Krom tiuj kvar artikoloj aperas du artikoloj de la redaktoroj de la revuo, en kiuj ni defiis unu la alian difini la intelektan aŭ fakan teritorion de Esperantologio kvazaŭ por krei gvidilon por la estonteco de la revuo. Mia redaktora kolego, la juna fakulo Guilherme Fians, rigardas en la estontecon kaj memorigas nin, ke difinitaj disciplinoj ofte antaŭeniras per polemikado: fakuloj prenas malsamajn poziciojn, kaj, kvazaŭ kemie, formiĝas nova substanco. Eta ekzemplo: en lastatempa numero de la revuo *Literatura Foiro* oni memorigas pri la siatempa konflikto inter Kalocsay kaj Baghy pri neologismoj – temo iam egale brula kiel bruliga. Ĝia rezulto: ĉefe konsciigo inter la esperantistoj, ke oni povas nek senbride inventi vortojn (kio estas ofte produkto de pigreco anstataŭ analizo de la signifo de la koncerna ideo) nek redukti la vortprovizon al iu deviga minimumo simple por igi la lingvon facila. Ĉu estas bezonata pli da tia polemikado, aŭ (kontraste) pli da konscia kunlaboro super lingvaj demandoj? Kiel eksa akademiano, mi balotus (aŭ voĉ-donus...?) por pli da konscia kunlaboro.

Kiel la artikolo de Fians ilustras, Esperantologio estas pli vasta teritorio ol simple ia specialigita lingvistiko. Eĉ oni povus aserti, memorante la historion de Ido (kiu komencis, aŭ stimulus, febran serĉadon de ideala lingvo kvazaŭ laŭdifine ne atingebla), ke la lingvistika aspekto de Esperanto estas malpli grava ol la historia kaj socia. Sur tiuj terenoj ni esperantologoj kapablu fari signifan kontribuon – kaj jam komencis tion fari. Mi esperas, ke en la paĝoj de *Esperantologio / Esperanto Studies* ni vidos artikolojn el ĉiuj tiuj disciplinoj.

Krome, ni esperu, ke, elprovinte siajn teoriojn en la paĝoj de EES, niaj fakuloj plantos tiujn ideojn en la grandajn fakajn revuojn kaj konferencojn: ne sufiĉas paroli al ni mem.

Kiam finiĝis la redakta periodo de nia kolego Christer Kiselman, mi en-saltis kiel kunredaktoro ĉefe por teni la revuon stabila kaj, se eble, vastigi kaj profundigi ĝian temaron. Ŝajne tiu celo estas jam atingita: ni havas junan kaj kleran redaktoron Guilherme Fians – kaj nun anoncis sian pretecon kungvidi la redakcion unu el la plej gravaj kontribuintoj al la fako interlingvistiko, Klaus Schubert, profesoro nove emeritiĝinta. Mi do nun retiriĝas kiel redaktoro, instigas al ĉiuj esperantoparolantaj fakuloj legi la revuon kaj kontribui al ĝi, kaj memorigas, ke, se EES estas loko kie esperantologoj povos interŝanĝi ideojn, egale gravas atingi la grandan ne-esperantan publikon per niaj fakaj scioj kaj konstatoj.

Humphrey Tonkin